

Naskiĝtaga festo de Esperanto
28an de Julio
15a – 19a horo
En Mori-Oogaj-memorejo
Luisenstraße 39

Programo:

- 15a h . salutparoladeto de s-ino Beate Wonde flanke de la memorejo
kun prezento de Mori Oogai kiel peranto inter germana kaj japana kulturoj
. enkondukaj paroloj de Fritz Wollenberg pri komenciĝonta UK de Esperanto
en Jokohamo kaj kelkaj esperantistaj rilatoj inter Japanio kaj Berlino
. paroladeto de Henryk Wenzel pri influoj de la japana literaturo al Esperanto-
poezio
- 16a h babilado ĉe tetablo
- 17a h prezentado de tekstoj el la rakonto „La dancistino“ de Mori Oogai en la
Esperanto-traduko de Ŝiger Ujeki lige al scenoj el la samnoma filmo
- 19a h Ni daurigos la kunvenon en la japana restoracio “Iŝin” en Mittelstraße 24 kun
japanaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj laŭ via gusto (individua pago)

Monkontribuo po persono: 3 €

Ĉijare Esperanto-Ligo Berlin invitas okaze de la UK de Esperanto en Jokohamo al
naskiĝtaga festo de Esperanto en la Mori-Oogai-memorejo. Kial?
Mori Oogai (1862-1922) en la naskiĝjaro de Esperanto 1887 loĝis tie, kie ni kunvenos
kaj studis proksime ĉe Robert Koch.
Li fariĝis eminenta peranto inter germana kaj japana kulturoj, tradukis ekzemple kiel
unua la „Fauston“ de Goethe kaj aliajn germanajn literaturajn verkojn en la japanan,
staras mem kiel „giganto“ ĉe la komenco de la moderna japana literaturo kaj esprimis
en gravaj verkoj renkontiĝon de oriento kaj okcidento.
Lia rakonto “La dancistino” ludas en Berlin kaj montras aŭtobiografiajn trajtojn.

Tradukoj el lia verkaro en Esperanto:

„La venĝo sur la kampo Goziingahara“, en: „El la japana literaturo – Meizi-epoko –
Antaŭ la dua mondmilito (1868-1945)“, Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1963
Rakontoj de Oogai, Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1962, Reprint 1979 “La
Dancistino” de Oogai MORI kaj “Kiel Rosperloj sur Folio” de Sooseki Nacume,
Zamenhof-Klubo, Tokio, 1984